# Francilia federacio
# KomitatKunsido (KK) 06/09/2024

## Partopreno

- Raymonde Coquisart, (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier, vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar, prezidanto (AK) forestas, donas sian voĉon al LPI
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Sabrina Rusch (SR) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) forestas, donas sian voĉon al LPI

## Ekde la antaŭa komitatkunsido

La protokolo de la lasta komitatkunsido 12/06/24 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj

04/07, vizito de Rainer Kurz, el Germanio kaj Aŭstralio, aktivulo en la esperanta movado (GEA, FAME, IKEF).

20/07, esperanta pikniko en Parko Monceau.

En aŭgusto, membroj de la komitato, AK kaj FLJ partoprenis la UKn en Tanzanio. DJ kaj PG partoprenis la italan kongreson en Toskanio.

17/08, okazis ne pikniko pro pluva vetero, sed esperanta kafejo proksime de la Placo de la Vogezoj.

## Kursoj

Ni bezonas tuj scii kiujn kursojn ni proponos dum la jaro 2024-2025, kun precizaj informoj : tago, horoj, prezoj, komencodato.

- cours pour débutants en présentiel, jeudi de 19h00 à 20h30, PG
- cours intermédiaire en présentiel, mercredi de 18h30 à 20h, Marianne Pierquin
- cours intermédiaire en ligne, vendredi de 18h00 à 19h30, Marc Giraud?
- cours supérieur en présentiel, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ

PG kuraĝigu kaj instigu siajn ekslernantojn al realîĝo por la venonta jaro, en pli altan nivelon. Komence de septembro, la instruistoj rekontaktu siajn eksajn lernantojn por instigi realiĝi.

La kursoj komenciĝos mardon la 1an de oktobro.

Prezoj de la kursoj, por la tuta jaro, inkludante la kotizon al la asocio:

- surloka kurso: normala prezo 109€, malalta prezo por senimpostuloj 45€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 40€
- reta kurso: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 15€

Reklamilo pri la kursoj : kiam ĉiuj informoj estos fiksitaj, LPI ĝisdatigos nian tutkoloran A3 afiŝon pri kursoj, FLJ printos por afiŝi en la sidejo kaj en salonoj.

# Varbaj eventoj en septembro

## Festo de asocioj en Paris Centre

Sabaton 14/09 10h-17h30 ĉe la urbodomo. Senpaga budo. Atentu, DL tiudate ne liberos. Deĵoros : PG (tute ne certas veni, pro familiaj kialoj), eble SR, eble RC matene, LPI, laŭdire Sarah amikino de Viktoro.

## Homarfesto

13-15/09, plu en Brétigny-sur-Orge. Espéranto-France buĝetis 3.000€ por ĉiuj salonoj. PG informos Espéranto-France pri niaj planoj en Homarfesto kaj Salon de l'éducation. Organizas AL. La Framadato (https://framadate.org/BJH8oDztND6N9op5 ) malsufiĉe plenas!

## Malfermaj pordoj

Sabaton 21/09 14h-18h. La evento estas anoncita en la dissendolisto de Paris Centre. Deĵoros : SR, eble AL, LPI, PG.

SR preparos afiŝon kaj flugfolion pri la malfermataj pordoj por disdoni dum la 2 antaŭaj varbaj eventoj kaj afiŝi en la sidejo.

21 septembre journée internationale de la paix : eblas afiŝi en la sidejo la prian afiŝon de UEA. FLJ prizorgas

Eblaj agadoj, preparendaj: ludoj, kvizoj, niveltestoj... LPI preparos nivelteston.

Por reklami la eventon, eblas enigi ĝin en vasta eventaro:

- Fête des possibles https://fete-des-possibles.org/ DJ faros
- Journée européenne des langues https://edl.ecml.at LPI faros

## Fulmkurso

30/09 19h-20h en la sidejo. DJ gvidos kaj preparos afiŝon.

## Salon européen de l'Education

15-17/11 en Parizo (Parc des expositions). La prezo de budo estas alta, sed la publiko estas nova kaj juna. Se restas iom da mono en la buĝeto de Espéranto-France pri salonoj post la Homarfesto, ni provos marĉandi budon. Eble organizos AL FLJ. Eble deĵoros DL, PG, FLJ, LPI.

# Zamfesto

Respondecas RC. Organizo kun la pariza grupo de SAT-Amikaro kaj la fervojistoj.

La dato estas 14/12/24 posttagmeze. La loko estas rue Traversière, kutima loko de la fervojistoj. La fervojistoj luprenos la lokon senpage, prizorgos la loterion kaj financos la programerojn fare de neesperantaj fervojistoj.

PROGRAMO (PROVIZORA)

| | | |
|---|---|---|
| • 14a 30 PREZENTO DE LA ASOCIOJ | 15 mn | (3 asocioj) |
| • Fabeloj de la verda pigo (Elizabeth) | 10 mn | (SAT-Am) |
| • Dancoj de neesperanta fervojista asocio | 15 mn | (fervojistoj) |
| • Zamenhofaj Proverboj (Bertrand Sajus) | ? | (SAT-Am) |
| • Poemo REVE (Eo fervojistoj) | 10 mn | (fervojistoj) |
| • Rakonto pri PEREIRE (Régis Fournier) | ? | (SAT-Am) |
| • Lumdancoj (Elizabeth Barbay) | 5 mn | (SAT-Am) |
| • Prezento de noveldonitaj libroj | ? | (SAT-Am kaj ni) |
| • 16a PAŬZO - LOTERIO - LIBROSERVO - TRINKEJO | | |
| • 16a30 Ŝercoj (RC) | 20 mn | (ni) |
| • Esperanta kantisto | 45 mn | (ni) |
| • 17a 40 FINO | | |

Nia federacio prizorgos la programeron pri esperantista kantisto. AK subtenas kaj proponas aprobon. DL proponas ke ni pagu nur parton, divide kun la aliaj asocioj. RC kaj aliaj diras ke ni nepre pagos ĉion, ĉar la aliaj asocioj ne pagos parton. Ni ricevis 2 proponjn, Armel Amiot 700€ kaj Guillaume Armide 300€.

Ni voĉdonas inter la 2 kantistoj:

- AA 6 voĉoj
- GA 0 voĉoj
- Sindetenoj 3
- Ne voĉdonas DL

La decido estas: Armel Amiot 700€.

Prezento de kelkaj libroj eldonitaj de Esperanto-France aŭ de SAT(-Am), eta libroservo kun la prezentitaj libroj: organizenda kun SAT-Amikaro. Kiu? Ĉu ni venigu Emmanuelle?

Trinkejo : ni prizorgos. DL pretas, sed ne sola. Eble PG, eble LPI.

# Projektoj

- Nia ŝranko: AL komencis ordigi la ŝrankon sed li bezonas "taquets" por subteni la bretojn kaj petos helpon.
- Finfermi la asocion Espéranto 94: AL, RC, PG, FLJ. Notinde: post la ĜA, la nova estraro estas registrita de la prefektejo de Créteil. FLJ kaj Sylviane iros al la banko.
- Civitaj dungitoj de Espéranto-France : EF dungos ĉi-jare, kiel laborigi la dungitojn?

  Demando: info@esperanto.paris ricevis mesaĝon de Agence comptable de l'Agence du service civique "AVIS DES SOMMES A PAYER Programme Erasmus+ Convention 2023-3-FR02-KA52-YOU-000175882" kun fakturo de 1.5035,20€. Tiu sumo estas repago de sumo antaŭpagita de tiu agentejo. Ĉu tiu mesaĝo koncernas JEFO aŭ Espéranto France? Respondo: necesas resendi la mesaĝon al ambaŭ.
- Kontakti la mezlernejojn pri la projekto MultLingva Akcelilo: dormanta
- Animation pour les habitants dans les cours d'école de Paris Centre le samedi: dormanta
- Disdoni librojn al publikaj bibliotekoj (detaloj en protokolo KK 22/03/24): dormanta
- Ministerio pri financaj aferoj: DL, LPI, PG, nenio nova
- Paĝmarkiloj: AL, necesos mendi kiam ne plu restos da
- Ĉapeloj : DJ plimalpli 400€ por 100, petos prezon
- Subglasoj: GVN, dormanta
- Badges, épinglettes : SR, dormanta
- T-ĉemizo kun pariza urbolinio, simila al tiu de Montrealo dum la tiea UK: PG

# Agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: Marc Giraud?
- Legoklubo: Marc Giraud?
- Junularaj agadoj: AL kun la junaj membroj, eble babilrondoj pluos
- Informado pri ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN ĉiumonate
- Espéranto café croissant: GVN, aleatore
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, AK ĉiumonate, lunde
- Prelegturneoj: FLJ, ne okazis sed eble denove okazos

Notu bone: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

# Respondeculoj pri informkanaloj (memore)

Informi pri niaj eventoj. La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook DL GVN https://www.facebook.com/esperanto.paris

- X (Tvitero) PG SR https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Vacapo: AK SR (Viktoro Simonnet) https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj: DL
- Instagramo: SR kontaktos Lulu Testudo kaj eble reprenos la konton de JEFO, kiun Lulu kreis

# Niaj retpoŝtadresoj (memore)

Adresoj kreitaj de nia federacio, administrataj de prezidanto kaj sekretario:

- komitato-francilio@googlegroups.com resendas al la komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com resendas al la membroj aliĝintaj por la jaro 2023-2024 (mane ĝisdatigata 16/03/24 sed ne poste)

Adreso kreita de nia federacio:

- amikaro-francilio@googlegroups.com resendas al ĉiuj interesatoj pri niaj eventoj, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi

Adreso kreita de Espéranto-France, ne uzita:

- francilio@esperanto-france.org iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi, vidu ĝian priskribon https://esperanto-france.org/sympa/info/francilio

Kontaktadreso de nia retejo https://esperanto.paris la resendadon administras Emmanuelle Richard:

- info@esperanto.paris resendas al la estraranoj kaj Said Baluŝi

# Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 06/12/2024 19h30, mikse. FLJ prizorgos la retaliron.

# FINO DE LA KK